


pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Jaro 97 • N-ro 3/2003 • ISSN 0032-2431



Polaj antikvaĵoj: la sinagogo „Malnova” en krakova kvartalo Kazimierz —
ene de ĝi troviĝas nuntempe la juda muzeo.

3
2003

Enhavtabelo:

REDAKTORE

67 Legu kaj vekigu!

94 Kelkaj konsiloj por kunlaborantoj (kaj ne nur).

HISTORIE – PORTRETOJ

69 Jan Zawada (1891-1975)

NUNTEMPE

73 Libera Folio – Io, ie serioze misas.

74 Demisiletero de Nikola Rašić.

75 Renato Corsetti – Krizo kaj Malkrizo

75-84 Primovadaj aktualaĵoj.

LINGVA ANGULETO

85 Preskaŭ ĉio pri akuzativo.

87 Kion fari pri akuzativo?

88 Tabelo de korelativoj.

KUTIMOJ – LEGENDOJ – LEGAĴOJ

89 Dronigo de Marzanna.

RELIGIE

90 Mariavitoj.

La kovrilpaĝo: Polaj antikvaĵoj: la sinagogo „Malnova” en krakova kvartalo Kazimierz – ene de ĝi troviĝas nuntempe la juda muzeo. Desegnis Andrzej Kołpanowicz.

pola esperantisto

socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare
eldonas: Eldonejo HEJME, <http://www.hejme.e-tools.pl>
Redakcia stabo: Zofia BANET-FORNALOWA, Czesław BARANOWSKI,
Zbigniew GALOR, Andrzej KOŁPANOWICZ, Ilona KOUTNY, Kazimierz
LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGĘZA, Stanisław MANDRAK, Danuta
ŻELIŃSKA kaj multaj kunlaborantoj.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj materialojn sendu al la adreso de la
eldonejo (tamen preferu retpoŝte: esperanto@hejme.e-tools.pl).

Jarabono pola: 30,00 PLZ pagenda al:

Wydawnictwo HEJME, 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21
BRE Bank SA-mBank • 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> • FEL-konto: <leja-t>

Jaro 97 • N-ro 3 / 2003 • ISSN 0032-2431

aktuala eldonkvanto: 220 ekz.

Legu kaj vekigu!

Karaj geomikoj,

kiam mi skribas tiujn ĉi vortojn, multaj el ni provas trovi respondojn je diversaj demandoj, kiuj staras antaŭ ni, kiel civitanoj de Pollando kaj kiel esperantistoj. Maturiĝas la tempo por decidi, ĉu ni poloj volas, ke Pollando eniru Eŭropan Union. Dum multaj jaroj ni revis pri libereco, kaj nun ni povas ekzameni ĝin... per libera elekto. En la mondo estingiĝas milito kontraŭ Irako, en Esperantujo daŭras diskuto, kiel plibonigi la servojn de UEA, fone de sinsekvaj demisioj...

Por mi persone la plej grava demando estas tamen, ĉu ni, esperantistoj, povas profiti de nia neŭtraleco en ĉiu aspekto de la vivo: politiko, sociaj aferoj, ktp. Kiel sciante, UEA estas neŭtrala organizaĵo. Antaŭnelonge iu oficisto de UEA plendis publike kontraŭ la usona atako al Irako, kaj ankaŭ publike li estis kritikita pro tio. Tio rompas — laŭ kritikintoj — la neŭtralecon de UEA. Preskaŭ samtempe SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj Esperanta Civito publike esprimis sian negativan sintenon al la usona atako. Ili „povis” tion fari, ĉar ambaŭ organizoj *feliĉe* ne estas „neŭtralaj”

Observante tiujn eventojn, mi rememorigis al mi iun pensigan esprimon: „Kiu silentas, tiu konsentas”. Ĉu vere esperantistaj organizaĵoj, pro sia „neŭtraleco” estas devigitaj silenti? Ĉu idealoj de paco estas subigitaj al tiu „neŭtraleco”? Ĉu tiuspeca „neŭtraleco” helpas aŭ malhelpas al Esperanto-movado? Kion vi opinias pri tio?

Ĝus mi aŭskultis la papan mesaĝon *Urbi et Orbi* okaze de Pasko. Ni esperantistoj, atendis la Esperantan eldiron, kiu denove (ne sen problemetoj) aŭdiĝis! „**Esperanto. Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta!**” Ankaŭ kelkfoje ni povis vidi grandan panelon kun surskribo ESPERANTO. Intere, ke en pola televido ĉiam, kiam la papo eldiras bondezirojn en Esperanto, neniam komentariisto (pastro) indikas la uzitan de papo lingvon (kontraŭe al ĉiuj aliaj). Ĉu ankaŭ tio estas „neŭtrala” rilato al Esperanto?...

Kvankam ni eniris la XXI jarcenton, en nia lando de tempo al tempo oni povas sperti „mezepokajn” antaŭjuĝojn, ankaŭ — bedaŭrinde — inter esperantistoj. „Enirante Eŭropan Union ni perdos nian identecon”; „Judoj kaj masonoj forĉetos

nian heredon” k.a. Ne gravas, ke tiaj aŭtoritatoj, kiel la papo mem, vidas en unuiĝanta Eŭropo la ŝancon por nia popolo kaj ŝtato, ke ni bezonas esti integra parto de Eŭropo, al kiu ni ĉiam apartenis, ke nur unuiĝo signifas la veran finon de la II Mondmilito. Ĉu la internacia lingvo Esperanto ne portas la ideon de unuiĝo, komuneco?

Nur unu aferon oni devas timi: proprajn antaŭjuĝojn, propran obskurecon kaj hipokritecon. Ni provu vidi aliajn kulturojn, aliajn naciojn, aliajn religiojn ne kiel minacon, sed kiel suplementon de nia propra kulturo, speciale kiam aliuloj loĝas inter ni. Tio koncernas ankaŭ aliajn lingvojn, kiuj „minacas” Esperanton. Kvankam neniu jam kredas, ke Esperanto venkos kiel la dua lin-

gvo de ĉiu homo, se ni „neŭtrale” silentos pri ĝia uzebleco kaj entute — ekzisto! — ni ne helpas al Esperanto mem kaj al Esperantujo. Sed ne sufiĉas paroli **pri** Esperanto; ni devas paroli **en** Esperanto, kaj paroli laŭte. La internacia lingvo ne estis elpensita por servi al si mem! Ĝi estas (estu!) **ILo** por konvinki la mondon, ke esperantistoj havas propran kulturon, ke ili havas propran vidpunkton pri vere gravaj aferoj, ke ili amas pacon kaj interkompreniĝon super ĉio! Ni ankaŭ partoprenu enmovadan diskuton, provu trovi plej bonajn rimedojn por supervenki malfacilaĵojn, obstaklojn.

Interne vi certe trovos kelkajn erojn, kiuj instigu al persona kaj komuna vekigo. Do, *legu kaj vekigu!*

Kazimierz Leja

Libera homo



*Oni min naskis ne demandante
Ĉu mi tion deziras,
Oni devigis min soldatiĝi
Kaj al batalo min tiras.*

*Oni trapafis al mi la kapon
Kvankam mi tion ne volis,
Kaj oni ĉiam min en la vivo
„Homo libera” titolis.*

el originalaj poemoj de L.L. Zamenhof

la rubrikon gvidas Zofia BANET-FORNALOWA

Jan Zawada (1891–1975)

Komence nepras atentigi, ke skizi vivon de Jan Zawada en malgranda artikolo estas afero preskaŭ neplenumbla. Tamen nepras, por ke tiu eminenta homo ne restu en forgeso.

Li naskiĝis la 23an de decembro 1891 en montara familio en vilaĝo Kamesznica, proksime de Żywiec, situata en Beskidy-montaro.

Jam dum gimnaziaj jaroj li kuntuŝiĝis kun socialistaj ideoj. Aparte profunde influis lin verko de konata socialisto-kooperativisto, verkisto Jan Hempel, s.t. „Kazania Polskie” (Polaj predikoj). La ideoj, kiujn li trovis en verkoj de Hempel-superba pensulo, multe impresis la junulon. Edukita en katolicismo li elŝiriĝas de ĝi, fariĝante ĉiam pli konvinkita liberpensulo. En postaj jaroj kunfondinto de „Asocio de Polaj Liberpensuloj”.

En la jaroj 1912–1917 Jan Zawada estadis eksterlande en Parizo, Zuriko, Vieno kie li perfektigadis en

lignaĵista metio. Li laboris kiel laboristo en diversaj establoj, plenumante plurajn laborojn. Ĉie li ligis kontaktojn kun lokaj socialistoj.

Socialisto li restis dum sia tuta vivo, ĉar lia vivcelo estis ŝanĝi la mondon je pli humana, pli justa. Oni povas lin nomi eterna revoluciulo en pensoj kaj laŭ altaj etikaj principoj, akorde al kiuj li kondutis kaj agis. Li

estis pacifisto kaj fervore batalis por paco, estinte aktivulo de Mondpaca Esperanto-Movado. Karakterizis lin vastaj penso-horizontoj. Tiukaŭze, havante nur mezlernejan instruitecon, dank’ al sia senĉesa memlernado, li akiris altan nivelon de scio. Li bone ekposedis ankaŭ kelkajn lingvojn. Estante socialisto li tamen daŭre serĉis...

El liaj profundaj studoj, kies celo estis memperfektiĝo kiel premiso al pli efika socia aktivado, sekvis i.a. lia fascino pri hinda filozofio, budhismo (dum kelka tempo li eĉ konsideris sin budhismo), ankaŭ enprofundigo

En la ciklo „Portretoj” la redakcio prezentas ĉi-numere silueton de Jan Zawada. Li ligas intermilitan historion de nia Movado kun tiu post la Dua Mondmilito. Al ĝia revivigo li multe kontribuis. Vera homarano, plurkampa kompetentulo Jan Zawada meritas resti en danka memoro de esperantistaro.

en diversajn aliajn mondkonceptajn teoriojn, en tio kosmologiajn.

Tiaj pasiaj studoj kaŭzis, ke li ne kapablis loki sin en unu partio, kun „ununure vera” mondkoncepto, kiel ekz. marksismo. Tio ne unufoje kaŭzis al li problemojn... Konservigi dokumentoj, kiuj atestas, ke en intermilita Pollando li estis „bone sekva-ta” de sekuraj fortoj, eĉ punita per plurmonata malliberigo kaj foriigo el laboro, ĉar li estis socialisto, eĉ komunisto. Aliflanke en Popola Pollando li estis forigita el partio, ĉar liaj interesiĝoj pri orienta filozofio kaj similaĵoj... ne decidis al socialisto. Nur dank’ al pledo, defendo fare de kelkaj altrangaj kamaradoj, i.a. de Bolesław Drobner kaŭzis, ke oni lin denove akceptis al la partio, sed konfiskitajn „malĝustajn” librojn li plejverŝajne neniam ricevis.

Jan Zawada serĉadis, fojfoje eraris, sed ĉiam sincere kaj drame. Ĉe la fino de la vivo li revenis al la religio, en kiu li junaĝe edukiĝis en familia hejmo.

Dum sia tuta vivo li laboris sur diversaj postenoj en kooperativisma movado. Li akiris altan scion pri tiu fako de socialisma movado. En komencaj jaroj de Popola Pollando li akiris tre altan postenon tie; estinte direktoro de kooperativa fako en unua postmilita registaro (PKWN), kiu fondiĝis en Lublin julie 1944.

Li signife riĉigis per siaj publikaĵoj pli ol 30 kooperativismojn. La saman nombron de verkoj pri temoj koope-

rativaj, sociaj kaj filozofiaj li tradukis polen el la ĉeĥa, angla, germana kaj Esperanto; ankaŭ el la pola al s.m. lingvoj. Estante specialisto en sia laborfako li instruis en kooperativaj lernejoj pri diversaj branĉoj de kooperativismo. Ne mirige, ke li klopodis disvolvadi kooperativismon en la Esperanto-movado.

Lia mondkoncepto kaj sekve vixelado klarigas la fakton, ke li fariĝis ĝisosta esperantisto. En 1920 li aliĝis al fondita unu jaron pli frue „Laborista Esperanto-Societo Praca-Laboro”. Tie li evidentigis neimageble inventeman aktivadon, funkciante ĉefe kiel sekretario de „Laboro”. Li harmonie kunlaborante kun aliaj k-doĵ J. Litauer, M. Wajsblum, W. Łętowski k.a. multe kontribuis al ekesto de pluraj terrenaj filioj, grupigantaj ĉefe laboristojn. Li organizis Esperantan Eldon-kooperativon, kies celo estis publikigi studmaterialojn por vaste organizataj kursoj; ankaŭ librojn, vortarojn. „Laboro” aranĝis „migrantan bibliotekon” por — per simbola pago — ebligis al laboristaro aliron al libroj. Li organizis legejojn, malmultekostajn korespondajn kursojn. Estinte organizo klasbatala, oni kapablis ligi fruktodonajn kontaktojn kun socialistaj organizoj ekster la Movado, kiel TUR (Societo de Laboristaj Universitatoj), samtendenca en juda medio BUND, k.a. „Laboro” estis ligita kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj same kiel ĝi funkciis kiel klerigejo kaj edukejo vere suk-



Jan Zawada

cese. Ĝi peris en distribuado de SAT valoraj libroj kaj revuoj por kiuj oni provis pagi po parte.

Komence de la 30aj jaroj la administraciaj instancoj, sub preteksto, ke „Laboro” estas infiltrata de komunistoj, ĉesigis ĝian agadon. Parto de aktivuloj surfronte kun advokato J. Litauer fondis en 1932 la Socialistan Esperanto-Societon (SES). Zawada, kiel kun li fojfoje okazadis, elektis alian vojon; li nun ekaktivis en tiel nomata neŭtrala Pola Esperanta Asocio, kion cetere oni kritike pri-traktis en „Sennaciulo” — la organo de SAT, kiel „troa patriotismo”... Ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito li apartenis al la plej aktivaj, sindonaj aktivuloj, evidentiganta plurkampan aktivecon.

Li ankaŭ apartenis al la unuaj, kiuj komencis revivigi la Movadon, tute detruitan dum nazia okupado. En la jaroj 1947–1948 li estis ĉefredaktoro de relanĉita „Pola Esperantisto”; an-

kaŭ en postaj jaroj li kelkfoje gvidis la redaktan laboron.

S-ano Zawada plenumis en renaskita PEA ankaŭ plej altajn funkciojn, ekde sekretario, ĉefredaktoro, vic-prezidanto, ĝis posteno de la prezidanto de la estraro. Li ankaŭ apartenis al la plej aktivaj preparantoj de la Jubilea 44 UK en Varsovio, 1959, kiel sekretario de Loka Kongresa Komitato (LKK).

Pro siaj meritoj li estis distingita en 1961 per la titolo „Honora Membro de PEA”, kaj en 1971, okaze de la jubileo de 50 jaroj de lia poresperanta aktivado, ankaŭ por promocii la polan kulturon pere de Esperanto, honorigita fare de Ministerio de Kulturo kaj Arto per distingito „Meritplena Kulturaganto”.

Granda estas la intelekta heredaĵo de Jan Zawada. Publikigita de li en 1929 „Vortaro Esperanto-pola”, same la postaj lernolibroj, fariĝis bazaj por lernado de Esperanto-historio en Pollando al kelkaj generacioj. Nemalhavebla por ĉiu esploranto de Esperanto-historio en Pollando estis prilaborita kaj eldonita de li en 1931 „Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj” kaj „Praktika Informilo Pri-Esperanta”. Aldone: „Bulteno de la Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj” en 1935. Bedaŭrinde, ceteraj planitaj ne aperis. Ja post nelonge okazis katastrofa Dua Mondmilito.

Dum sia tuta vivo Zawada interesiĝis pri historio, kolektis ĉi-rilatajn interesaĵojn. Li estis rekonata

kiel homo tre fidinda, respondeca; tiukaŭze la instancoj planantaj ĝisdatigon de Enciklopedio de Esperanto, eldonitan en 1933–1934 petis lin kolekti materialon, rilatanta polandan E-movadon. Li ekokupiĝis pri tio fervore kaj transprenis la kolekton de alia esploranto de la historio de E-movado en Pollando, Kazimierz Domosławski, por ankaŭ ĝin prilabori. Bedaŭrinde, nek la planita Enciklopedio de Esperanto aperis nek estas sciate, kio okazis kun tio, kion li kolektis kaj prilaboris.

Jan Zawada estis kaj ŝatanto kaj konanto de pola literaturo. Fojfoje li skribis artikolojn kaj recenzojn ĉirilatajn. Li ankaŭ grave diskonigis la

plej grandan polan romantikan poeton Adam Mickiewicz per sia traduko al Esperanto de biografia libro s.t. „Adam Mickiewicz”, verkita de Mieczysław Jastrun. Tiun ĉi libron oni tradukis el Esperanto al la ĉina.

Jan Zawada — eminenta, tre kapbla plurkampe idealisto, krome homo ĉarma, kiun oni epitetis „Ora koro” pro lia preteco ĉie kaj ĉiam kunlabori, helpi, devas resti en koroj kaj memoro de esperantistoj.

Ĉi artikolo estu eta omaĝo al fervora samideano, al kiu la pollanda, sed ne nur, Esperanto-movado multe dankŝuldas.



Zofia Banet-Fornalowa



Ĝustigoj kaj korektoj

✿ En la artikolon de Zofia Banet-Fornalowa: „Ĝi renaskiĝis kiel... fenikso el cindroj” publikigitan en la 2a n-ro de *Pola esperantisto* enŝteliĝis kelkaj eraroj. Jen la ĝustigoj de ili:

paĝo 35, 3a alineo, 4a verso, devas esti: pereis (anst. perdis);

paĝo 37, 8a alineo, lasta verso, devas esti: — p. 48–57 (anst. 52–52);

✿ La kunaŭtoro de *Ampleksa Pol-Esperanta Vortaro*, Kazimierz Strzelecki sciigis nin pri amplekso de la verko: ĝi entenas 268.260 da vortoj (polaj kaj Esperantaj) kio signifas 2.027.887 klakoj sur komputila klavaro. Ĉiu esperantisto aŭ E-organizo rajtas represi la verkon aŭ ties parton sen permeso de la aŭtoroj, kondiĉe ke la represaĵo ne estos vendata.

NUNTEMPE

Antaŭ jaroj neniu eĉ supozis, ke interreto prenos inter esperantistaro la lokon de ĉefa inform-kanalo. Tamen tiel okazis, kaj ĉiuj interret-uzantoj povas ĝoji pro tio, ke ili kiel la unuaj povas ekkoni diversajn novaĵojn, kiujn „simplaj legantoj” devas longe atendi...

Bedaŭrinde, ne ĉiuj novaĵoj, kvankam aktualaj, ĉiam estas ĝojigaj. Tamen ili portas iun mesaĝon, informon, kiujn ni – pro ĵurnalista devo – provas plu disvastigi. Lastatempe ekestis en interreto grava paĝaro, bela por la okuloj, moderna, kaj farita de homoj, kiuj – simile kiel ni – volas paroli pri ĉiuj aferoj de la nuntempa Esperanto-movado, ankaŭ pri la temoj-tabuoj.

Publikigante la subajn tekstojn trovitajn sur paĝoj de „Libera folio” ni havas nur unu celon: diskonigi la informojn por tiuj, kiuj ne uzas interreton, sed devus scii, kio okazas en Esperantujo. Kaj se iu el la legantoj volus poste komenti priparolitajn eventojn el tiu rubriko, tiu faru tion senhezite.

Kazimierz Leja



lo, ie serioze misas.

Jam sep oficistoj kaj volontuloj forlasis proteste la Centran Oficejon de UEA, post kaj pro la elekto de la nuna Estraro en 2001.

Pri la nuna krizo de UEA ne skribas ties oficiala organo. Ŝrumpas la membraro, kadukiĝas la servoj — dume la Estraro dankas kaj gratulas, planas kaj malplenumas. Sed kial tiu krizo, kaj kie la eliro? Sen analizo de kaŭzoj, ĉu eblas esperi solvojn?

Por esplori kaj informi sendepende kaj senpartie, naskiĝis hodiaŭ Libera Folio.

István Ertl
Kalle Kniivilä

Libera Folio estis lanĉita la 12an de aprilo. Post precize unu semajno, la 19an de aprilo, ni jam havis nian milan viziton. La tuja populareco de Libera Folio klare montras, ke novaj, sendependaj voĉoj estas bezonataj en la esperanta gazetaro. Pri kio vi volus ke ni skribu? Sendu al ni viajn proponojn kaj opiniojn!

Jen la adreso:
folio@xrs.net

D e m i s i l e t e r o de Nikola Rašić

Nikola Rašić, Konstanta Kongresa Sekretario demisiis de sia posteno ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA). Jen lia demisiletero:

Estimataj,

Mi informas vin ke mi decidis demisii de mia posteno de Konstanta Kongresa Sekretario de UEA kaj forlasi la Centran Oficejon. Komence de majo mi komencos uzi miajn feriajn tagojn kaj post tio mi petas ĉesigi mian laborrilaton kun la Asocio.

Dum aprilo mi ŝatus transdoni miajn taskojn kaj lasi la kongresajn aferojn en bona ordo. Mi ankaŭ ŝatus informi LKK kiel eble plej frue pri la situacio. Mi daŭre restos por diversaj demandoj je la dispono de LKK-anoj, eĉ se tute private, ĉar mi ne ŝatus ke ili suferu pro mia decido.

Dum dek kvin jaroj mi plenumis tiun ĉi laboron, plej ofte kun granda plezuro mia kaj ŝajne ankaŭ de iuj kongresanoj kaj kunlaborantoj. Mi ankaŭ havis privilegion labori kun kaj sub la gvido de personoj kiaj estis Simo Milojević, Osmo Buller kaj Pasquale Zapelli. Same agrable estis labori kun bonegaj kolegoj, nunaj kaj eksaj, ĉiuj sindediĉaj esperantistoj kaj inspirigaj konantoj de siaj respektivaj fakoj. Mi ankaŭ kunlaboris kun amaso da memorindaj estraranoj kaj aktivuloj, kio pliriĉigis min diverssence.

Dum la lastaj du jaroj mi ne plu havas tiun senton, same kiel iuj aliaj

kolegoj. Kun la tempo tiu sento konstante kreskis, samkiel la konvinko ke la situacio estas sufiĉe senespera. Tiu situacio, laŭ mia opinio, estas rezulto de la politiko kaj agadmaniero de la Estraro kaj oficeja gvidantaro dum la lasta periodo. Mi ne aprobas ĝin ĝis tiu grado ke mi ne povas plu resti parto de la sistemo. Eble mi foje aparte klarigos pli detale miajn starpunktojn pri tio.


Mia decido estas definitiva kaj mi ne volas plu trakti pri ĝi. Mi petas ke oni respektu tiun deziron.

Mi dankas al vi ĉiuj por via ĝisnuna kunlaboro kaj pacienco.

Nikola Rašić

Roterdamo, 3 apr 2003

el La Ondo de Esperanto 5/2003



Komentariojn (ankaŭ polemikajn), de Claude Piron, Trevor Steele, Osmo Buller kaj aliaj eminentaj esperantistoj, ankaŭ la intervjuon kun Nikola Rašić kaj Renato Corsetti vi povas trovi kaj legi sur la paĝoj de Libera Folio. La retadreso estas:

www.algonet.se/~kallekn/folio/

Krizo kaj Malkrizo

La krizo en UEA estas profunda, tre profunda. Sed ne temas pri la funkciado aŭ nefunkciado de la Centra Oficejo, pri la kovrilo de la jarlibro kaj ĝia aperodato, temas pri io tre pli serioza. Temas pri tio ke Giorgio Silfer transprenis la potencon ankaŭ en UEA. Li estas tre lerta, tion ĉiuj scias. Li ne banale transprenis la potencon en la senco, ke li pagis sian kotizon kaj elektiĝis prezidanto de UEA. Ne, li transprenis la mensojn de ĉiuj movadanoj.

Mi volas diri, ke sufiĉas ĉirkaŭrigardi por vidi la influon de la raŭmismaj ideoj, ĉie, absolute ĉie. Pri kio interesiĝas la membroj de UEA? Pri tio ke la komunumo estu bone servata. Ke estu eldonataj multaj libroj en Esperanto, ke estu organizataj la Belartaj Konkursoj, ke la revuo enhavu difinitan rubrikon kaj ne enhavu alian, ke la Universala Kongreso estu tia kaj ne tia, ktp...

UEA ankoraŭ ne estis akceptita de PEN Internacia, kaj ne petis aliĝi al la Civito, sed tio estis nur taktikaj movoj por ne malkaŝi la realon. La bedaŭrindaj finvenkistoj, tiuj, kiuj iam opiniis, ke ni laboras por ke Esperanto estu la dua lingvo de ĉiuj, ne havas facilan vivon. Informado kaj informiloj, kio estas tio kaj kiu pretas elspezi por tio? Se la decidantoj en UEA devus elekti inter pliaj kolo-roj en la revuo kaj informkampanjo en Indonezio, kion ili elektus laŭ vi?

En ĉi tiuj kondiĉoj kelkaj finven-

kistoj pretervivis en la ĝangaloj de Brazilo aŭ de Barato, sed iliaj tagoj estas jam ĉe la fino.

Kaj tamen estas ankaŭ malkrizo.

Aro da maljunaj eŭropanoj ankoraŭ revas la revon de sia juneco kaj subtenas finance. Granda aro de junaj eŭropanoj kaj amerikanoj lernas per la reto. Multe pli ol ILEI estus iam ajn revinta kolekti. Ili, kompreneble, sentas lojalecon nur al sia komputilo kaj al sia servilo. En la ĝenerala listo esperanto-l@esperanto.org, konata ankaŭ kiel SCE, usonano demandis (preskaŭ laŭvorte): „Iu bonvolu klarigi al mi, kio estas ĉi tiuj UEA kaj TEJO, pri kiuj de tempo al tempo oni parolas. Ĉu ili estas serviloj por la hejmpaĝoj de esperantistoj?”

Kaj ekzistas ankaŭ amaso da neeŭropanoj kaj ne nord-amerikanoj, de tiu speco, kiu neniam iros al Universala Kongreso kaj neniam aĉetos paperan libron je nederlandaj prezoj (la reto kaj Franko Luin igis la eldonadon de libroj relative superflua. Vi povas senpage ricevi multe pli da libroj ol vi povos iam ajn legi, se vi havas komputilon).

En tiu senco la malkrizo almenaŭ konkurencas kun la krizo kaj kun Girogio Silfer, kiu kaptis UEA-n. Ne estas klare, ĉu li sukcesos teni ĝin.

Renato Corsetti

Pli simple ĉe UEA!

La retejo de UEA: www.uea.org komence de aprilo ricevis novan pli modernan aspekton kaj grandpar-

te aktualigitan enhavon. Laŭ multnombraj reeĥoj la vizitantoj trovas, ke en ĝi nun eblas pli facile orientiĝi, ke la paĝoj pli rapide malfermiĝas kaj ke la retejo aspektas profesiece kaj donas agrablan impreson.

Enhavante la retejo pli proksimiĝis al la Gvidlibro pri Esperanto–movado: ĉi tie oni trovas listojn de E–kursejoj, liston de la universitatoj, en kiuj oni instruas Esperanton (kompilitan de G. Pirlot), listojn de fakaj E–asocioj, regularojn, varbilojn, artikolojn kaj multegajn aliajn utilajn informojn — entute preskaŭ 1000 paĝojn.

Draste renovigita estis la parto „Landoj”. La informoj estas aktualigitaj (kaj daŭre aktualigataj laŭ venantaj informoj) kaj iĝis pli facile alireblaj. Tio okazas ne nur ĉar la paĝoj troviĝas malpli profunde en la strukturo de la retejo, sed ankaŭ ĉar ĉiu el ili ekhavis aldone mallongan kaj facile konjekteblan adreson.

Do, ekzemple la paĝon kun informoj pri E–organizoj en Pollando oni povas nun atingi per la adreso

<http://pollando.uea.org>

kio estas ja pli simpla kaj belspekta adreso ol la fakta —

http://uea.org/landoj/orienta_europo/pollando.html.

Tute simile oni povas atingi ajnan alian lando–paĝon:

<http://brazilo.uea.org>,

<http://japanio.uea.org>, k.s.

Aperis ankaŭ „kontinentaj” mallongigoj:

<http://ameriko.uea.org>,

<http://afriko.uea.org>,

<http://azio.uea.org>...

— tiuj gvidas al la paĝoj de la regionaj komisionoj de UEA.

La reorganizajn laborojn en la retejo faris Dirk Bindmann, kiu prizorgis la novan aspekton kaj navigadon, Joost Witteveen, funkciiginta la sistemon de mallongaj landaj adresoj kaj Andrej Grigorjevskij, efektive viginta rekodigon kaj aktualigon de la enhavo.

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA*

Lernu!

La 21an de decembro 2002 startis nova paĝaro por Esperanto — www.lernu.net/lernu.php.

En la paĝaro estas informoj pri Esperanto kiel lingvo kaj fenomeno kaj pluraj kursoj kaj subteniloj por lerni Esperanton. La ĉefa celo de la paĝaro estas helpi al retemuloj kiuj volas facile kaj senkoste informiĝi kaj lerni la lingvon.

Projekton perfekte preparis junaj personoj el TEJO. Aktuale estas tradukoj al sep lingvoj (ankaŭ la pola), sed atendas longa vico de aliaj lingvoj por tradukado.

Laŭ mi tio estas por Vi bona helpilo konvinki la personojn, kiuj volas lerni nian lingvon al bona kaj amuzala lernado.

Dua afero estas eduka ludilo.

Multaj el vi konas „scrabble”. Nun Vi povas ludi ĝin per Esperantaj vortoj. Sufiĉas eniri al: <http://skrablo.komputilo.org/skrablo.php>

Dezirante bonan laboron por Esperanto (per „lernu!”) kaj bonan ripozon kun Esperanto (per „skrablo”) samideane salutas Vin

Staman

Jena informero aperis en NUN:

Virtuala UK 2003 por nekongresanoj

La ĉijara 88a Universala Kongreso, okazonta en Gotenburgo, Svedio, funkciigos ankaŭ t.n. virtualan kongresejon, en kiu nekongresanoj povos sekvi la laborojn de la kongreso lege, bilde kaj aŭde. Tio estos la unua klopodo, tial pionira. Krom legi kaj aŭdi pri la diversaj aranĝoj, eblos sendi mesaĝojn al ĉiuj kongresanoj (ĉiu ricevos propran retadreson, kiu funkcios nur dum la kongresa semajno), pridiskuti la kongresan temon kaj aŭskulti eldirojn de kongresanoj. La virtuala kongresejo funkcios ĉe la adreso: www.uk-2003.net. Atentu! Tiu reteja adreso ankoraŭ ne estas aktiva!

Franko Luin inko@algonet.se



Kunsidis la Ĉefa Estraro de PEA

Sabate, la 22an de februaro 2003 renkontiĝis en Gliwice estraranoj de PEA por laŭvica kunsido. Venis estraranoj el Varsovio (Lech Piotrowski), Piotrków Trybunalski (Jan

Książek) kaj lokaj anoj: Danuta Żelińska, Stanisław Mandrak kaj Aleksander Zdechlik. El malproksima Szczecin venis ankaŭ ano de la Ĉefa Revizia Komisiono — Stanisław Gończaruk. Aliaj estraranoj ne povis veni pro malsano.

Dum la kunsido oni preparolis multe da organizaj aferoj. Plej gravaj problemoj estas fincaj. Dank’ al kompreno de nia situacio de unuopuloj kaj kelkaj filioj, kiuj transdonis al ni kotizojn, ni povis kovri la kostojn de eldonado de la lastaj numeroj de „Wydarzenia”.

Tre alte estis taksita la laboro de Jan Książek kiel ĉefdelegito kaj peranto de UEA. Invitita gasto, kol. Kazimierz Leja, preparolis problemojn kun la redaktado de „Pola Esperantisto”. Daŭre estas bezonataj kunlaborantoj kiuj povus serioze kunlabori por la sekvaj numeroj de „PE”. Estis preparolitaj esperantaj aranĝoj kaj renkontiĝoj pri kiuj oni informis la Ĉefan Estraron aŭ „PE”. Oni diskutis ankaŭ pri problemoj kun instruado de Esperanto. Ni bezonas modernajn lernolibrojn, laŭ kiuj oni povus instrui en lernejoj. Estas jam en interreto kelkaj E-kursoj por poloj, sed ne ĉiuj havas eblecon uzi komputilon. Estas bezonata pli forta informado pri Esperanto kaj kontaktoj kun lokaj ĵurnalistoj.

Se temas pri kunlaboro inter PEA kaj aliaj societoj okazis, ke post dissendo de la proponoj al ĉiuj asocioj kaj rondoj funkciantaj en Pollan-

do, revenis nur unu vera respondo el Krakovo, kies societo deklaras kunlaboron. Tia situacio ne permesas pensi optimisme pri integriĝo de esperantistoj en Pollando dum la plej proksima tempo.

Ĉar proksimiĝas la finperiodo de funkciado de la nuna Estraro oni devas pripensi la tempon de la elekto de nova Estraro. Lige kun tio en filioj oni preparu kunsidojn kun la elekto de delegitoj al kunsido de delegitoj de PEA. Preparado al tiuj kunsidoj povus helpi ordigi la membraron en la filioj, por ke PEA sciu pri vera nombro de siaj anoj.

Ĉefa Estraro de PEA

Lodza-Varsovia Agado

En Lodzo la 22-23an de marto 2003 okazis kutima jam renkontiĝo de lodzaj kaj varsoviaj esperantistoj. La programon de la vizito preparis Robert Kamiński, prezidanto de Lodza Filio de PEA, varsovian esperantistaron reprezentis membroj de klubo „Varsovia Vento”.

La ĉefa punkto de la renkontiĝo estis priparolo de la ambaŭflanka kunlaboro, krome la plano antaŭvidis viziton en la Lodza Radio (Radio Łódź 99,2 MHz) partopreni interparolon pri Esperanto kaj ĝia hodiaŭa realeco. Dum 15 minuta disaŭdigo la aŭskultantoj eksciis ke Esperanto daŭre vivas, fartas bone kaj plu servas kiel valora ideo ne nur en Lodzo kaj Varsovio. La disaŭdigon gvidis

red. Małgorzata Warzecha, respondadis al la demandoj Robert Kamiński kaj Arletta Jurkiewicz el Lodzo, Ireneusz Bobrzak, Irmina Szustak kaj Anna Bichta el Varsovio. Fine de la disaŭdigo varsovianinoj prezentis E-kanzonon „Malfrue jam” kun gitara akompano.

Al la gvidanta la programon redaktorino la intervjuo pri Esperanto plaĉis al tiu grado, ke ŝi proponis daŭrigi la temon en 30-minuta jam disaŭdigo. Tiu ĉi okazos fine de majo dum sekva, planata ambaŭflanke, vizito de la „Ventanoj” en Lodzo.

Post la radio-vizito la teamon eniris s-ino Elżbieta Kemblowska por, helpe de flugfolioj, kune informadu pri Esperanto en turistike taŭga centro de la urbo ĉe la ĉefa strato Piotrkowska. Krome dum tiu ĉi tago okazis tre agrabla vizito en Muzeo de Urba Historio, troviĝanta en Palaco de iama fabrikposedanto Izrael Poznański, kiun ĉiĉeronis esperantistino Elżbieta Pisanko, kaj ankaŭ tre ĉarma vespero kun esperantistoj venintaj renkontiĝi kun varsovianoj hejme de s-ino Zofia Śmistek.

Por revigligi lodzan junularan





grupon ni planas inviti al nia agado lernantojn el lodzaj lernejoj, kiuj partoprenis en konkurso pri „Scio pri Esperanto kaj Ludoviko Zamenhof”. La konkurso jam duan fojon okazis en Lodza XXXI liceo je la nomo „Ludoviko Zamenhof” dum festa tago de patrono. Reciprokaj vizitoj estos certe valoraj kaj komencos novajn kontaktojn kaj amikajn rilatojn. Se ni volas rekonstrui E-movadon, ni devas pensi pri junularo kaj oferdoni al ili multe da atento.

Ireneusz Bobrzak, Irmina Szustak
Robert Kamiński


Ekspozicio en Bjalistoko

La 10an de aprilo oni malfermis la ekspozicion de Esperantaj bildkaj poŝtkartoj el la kolekto de Stanisław Mandrak. En la Vojevodio Centro de Kulturo oni povis rigardi pli ol 250 bildkartojn el pli ol 1500 kiujn kolektis dum multaj jaroj prezidanto de PEA.

Ekspozicion preparis Bjalistoka Esperanta Societo, kiu organizis ankaŭ konkurson por gejunuloj pri poŝtkarto kun la temo: „Esperanto”. Premiojn por gajnintoj donacis

urbestro de Bjalistoko. Lige kun la ekspozicio estas preparita porokaza E-ŝtampo kaj E-poŝtkarto. Ekspozicio, kiu daŭris ĝis la fino de aprilo estis bona promocio de la lingvo internacia kaj de ĝia uzado en naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof.

Pri la ekspozicio informis lo-



kaj gazetoj kaj loka TV. Prezidanto de PEA kaptis la okazon interparoli kun lokaj esperantistoj pri plifortigo de kunlaboro inter PEA kaj BES.

„Varsovia Vento” blovas

De tempo al tempo ni estas informitaj pri E-agado de junaj varsoviaj. Ilia laboro por promocio de lingvon internacian povas esti modela por aliaj rondoj kaj grupoj en nia lando. Interesaj artikoloj en „Tornado”, informado pri nia lingvo sur varsoviaj stratoj, instigado al „ludo kun Esperanto” inter gejunuloj estas nur parto de iliaj ideoj. Mi certas, ke junaj varsoviaj geesperantistoj kun ilia „motoro” Irek Bobrzak multfoje informos nin pri sia agado.

Post kelkaj horoj inter ili mi povis konstati, ke nia estonteco ne estos

„tro griza” se iuj postsekvos la blonvon el Varsovio.

Kun junaj varsovianoj „amuziĝis”
Stanisław Mandrak



Varsovia Vento prelegis en la XIV varsovia Staszic–Liceo

En Varsovio la 26an de aprilo Varsovia Vento-klubo prelegis pri Esperanto dum Tagoj de Eŭropo, organizitaj de la licea junularo en la XIV Staszic–Liceo. Inter klasoĉambroj je la nomoj de UE–landoj aperis ankaŭ... ESPERANTUJO!

Dum kvin horoj daŭranta aranĝo pri Esperanto partoprenis tri klasaj grupoj de gejunuloj eksciinte la historion, kulturon, nuntempon de la movado kaj provekzercinte la lingvon. Unu prelego daŭris 60 min.

En la preleg–salono organizita estis E–ekspozicio de la libroj, gazetoj, ktp., per televidilo oni prezentis Mazi–kurson.



Junularo el diversaj klasoj, kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto dum enketado, organizita antaŭ la aranĝo. La foto montras nur unu grupon (el entute tri).

Inter ili niaj aktivuloj: (de maldekstra flanko) — Atsuhiko Taniguchi (el Japanio — loĝanta nun en Varsovio), Irmina Szustak (kun identigilo), Zbyszek Pastor (PEA–Varsovio), Anna Bichta, Joanna Jakielska, Zbyszek Kowalski (PEA–Varsovio). ❀

Estrar–elektoj en Lodzo

La Estraro de Lodza Filio de Pola Esperanto–Asocio informas, ke dum la elekta kunsido la 4an de aprilo 2003 oni elektis la novan Estraron, konsistanta el: Prezidanto — Robert Kamiński, Viceprezidanto — Elżbieta Kembłowska, Kasisto — Zofia Śmiśtek, Sekretario — Aleksander Kamiński. Membroj de la estraro: Emilia Pruszyńska Arletta Jurkiewicz.

Al nova Revizia Komisiono oni elektis gekolegojn: Henryka Szumigaj, Maria Srogosz kaj Juliusz Pruszyński. ❀

Per Esperanto al interlerneja kunlaboro

Estas sciante, ke multaj lernejoj en Pollando komencis jam interlernejan kunlaboron kadre de eŭropa projekto SOCRATES–COMENIUS. Ŝajnas al mi tamen, ke tiu ĉi kunlaboro celanta al profundigo de la ideo pri eŭropa civitaneco, baziĝas grandparte sur la angla lingvo. Oni povas supozi, ke malmultaj lernejoj aliĝis al realigo de Comenius–Projekto surbaze de neŭtrala lingvo Esperanto.

Meze de januaro 2003 j. atingis min interesa retmesaĝo de nia prezidanto Stanisław Mandrak, rilate la „Interkulturan–Interlernejan Kunlaboron per Esperanto”. Traleginte la mesaĝon pli forte ekbatis mia verda koro. Preskaŭ tuj mi sendis retroŝton al portugala instruisto Luis Ladeira, proponinta kunlaboron per Esperanto inter kvar eŭropaj gimnazioj.

Lia afabla respondo venis al mi fulmrapide. Li ankaŭ sendis al mi rete la 22–paĝan Aplikad–Formularon de Lerneja Projekto Comenius. La tempo urĝis. Ĝis la fino de februaro oni devis plenigi ricevitan Aplikad–Formularon kaj sendi ĝin al Varsovio. Havante necesajn informojn kaj dokumentojn mi renkontiĝis kun direktoro de la Urba Edukad–Fako por prezenti interesan proponon de portugala instruisto. Li promesis organizi specialan konferencon de lernejestroj, dediĉitan nur al tiu ĉi afero. La konferenco estis vere fruktodona.

Ĉiuj direktoroj de koŝalinaj gimnazioj ricevis de mi multajn buŝajn kaj skribajn informojn pri Esperanto kaj pri ĝia utiligado en lerneja laboro.

Mi estis agrable surprizita, kiam post kelkaj tagoj direktoroj de tri gimnazioj esprimis pretecon realigi la projekton de Comenius per Esperanto. El inter tri lernejoj mi devis tamen elekti nur unu lernejon, kiu ĝis nun ne realigis la projekton de Comenius. En la elektita lernejo, Gimnazio N-ro 7, mi pasigis multajn horojn por kune kun direktorino plenigi la ricevitan Aplikad–Formularon kaj precizigi celojn de dujara kunlaborado inter kvar gimnazioj en Portugalio, Hispanio, Hungario kaj Pollando. Estis vere temporaba laboro, sed ni sukcesis ĝustatempe sendi aliĝdokumentojn al Varsovio.

Nuntempe tri instruistinoj de tiu ĉi lernejo diligente lernas Esperanton, por instrui ĝin ekde la unua de septembro 2003 j. Mi havigis al ili esperantajn lernolibrojn, vortarojn, diskedojn kaj CD–diskojn kun E–kursoj. Mi ankaŭ volonte helpas al ili en la lernado de Esperanto. Ĉiu instruistino havas propran retadreson, kaj apartan **Esperantan retadreson** havas jam la lernejo. (Jen ĝi: **gim7@esperanto.wp.pl**). Oni povas sendi al Direktorino gratulvortojn en Esperanto, ĉar ŝi ankaŭ lernas nun la lingvon internacian.

Pri koŝalina gimnazio ekinteresiĝis jam ĵurnalistoj de TV–Szczecin. La 4an de aprilo ili intervjuis direk-

torinon, instruistinojn, gelernantojn kaj min pri la planoj por estonto. La planoj estas vere ambiciaj. Jam baldaŭ estos okazo pridiskuti ilin kun portugalaĵ geinstruistoj. En la tagoj 8–10 de majo 2003 la lernejo gastigos 3-personan delegacion de portugala gimnazio, koordinanta laboron de tri partneraj lernejoj. Estos do renkontiĝo kun direktorino, kun pedagogia konsilantaro, kun gelernantoj kaj kun instruistinoj, kiuj post 4 monatoj komencos instrui Esperanton. Koncizan raporton pri tiu ĉi vizito mi sendos meze de majo.

Czesław Baranowski, Koszalin



Nova Esperanta temvortaro

La Angla–Esperanta–Hungara temvortaro de Ilona Koutny prezentas ĉ. 1200 vortojn kaj frazeologiajn esprimojn rilatajn al du inter la fundamentaj agadsferoj de la homo: LERNADO kaj LABORO. Ega praktika valoro de tiu-specaj vortaroj estas, ke en ili oni trovas vortprovizon koncernantan iun vastan temon en unu loko, sen neceso serĉi unuopajn vortojn en alfabetaj vortaro (en kiu cetere aktuale mankas iuj, precipe novaj). La vortaro helpas do progresigi en la lingvo lernantojn, kaj tiujn, kiuj opinias sin bonaj esperantistoj — pliriĉigi sian vortprovizon kaj plifirmigi sian esprimokapablon. Sed, anstataŭ teoriumi, ni rigardu la riĉecon de la lingva materialo de unu el la temoj.

La domeno „Laboro” enhavas jenajn partojn (aldone ni citas ekzemplojn elektitajn el inter multaj):

1. LABORO ĝenerale, i.a. intelekta, krea laboro; teamlaboro; kromlaboro, pluslaboro; volontulo;

komenci/entrepreni laboron, dungi/engaĝi iun; labormaniulo; laborevitanto;

enuiga, teda; elĉerpa; neleĝa, nigra; nepreciza, surfaca laboro.

Kelkaj subtemoj de ĉi tiu ĉapitro:

labori kiel (ekz. redaktoro); labori pri io; labori fortostreĉe, haste ktp.

profesio; kategorioj kaj ecoj de laboristoj, ekz. malkonkordema laboristo, kontaktema, komunikiĝema, elturniĝema;

laborforto, laborulo, laborloko, posteno.

2. DUNGO, kun i.a. la subtemoj: **laborperejo, instruiteco, biografio, kariero, sindikato.**

3. LABORKONDIĈOJ, kun i.a. **salajro, labortempo, skipo, ferioj, laborprotektado.**

4. OFICEJO, kun i.a. **oficejaj mebloj, iloj, dokumentoj, sfero de komputilo, interreto (!).**

5. DIVERSAJ PROFESIOJ.

La leksikan kaj frazeologian materialon sekvas tre valoraj, interesaj leksikaj kaj komunikaj EKZERCOJ ĝin memorigantaj, plikonsciigantaj nunandiferencojn inter vortoj k.t.p. Ilin formas kvar tipoj de aktivajtoj: vortprovizaj esploroj, gramatika refreŝiĝo, prezento kaj ludado de scenoj, preparado de diskutoj kaj raportaj, eseaj, intervjuaj hejmtaskoj.

Uzanto de tiu libro disponas pri profesinivela (memoru, ke tiu eco de lerniloj estas sufiĉe rara en Esperantujo), firdinda kaj celtrafa verko.

Diversaj lingvoj diversmaniere esprimas la eksterlingvan realon, pro tio te-

mvortaro ne donas laŭvortajn tradukojn, sed ekvivalentojn de esprimoj en la komparataj lingvoj. Indas do aldoni, ke tiuj, kiuj konas/lernas la anglan

aŭ hungaran, ege profitos ne nur por pliprofundigi sian lingvokonon, sed ankaŭ ĝuos interlingvajn kaj interkulturajn komparojn.

Kaj nun — mallonga TESTO.

Temo: **skribilo**.

Bonvolu kovri ĉi-suban dekstran vortkolumnon kaj sur blanka folio skribi Esperantan tradukon. La respondojn bonvolu kompari kun la solvoj en la dekstra kolumno.

Bonvolu diri/skribi en Esperanto:

1. długopis	1. globkrajono
2. wkład (do długopisu)	2. kartoĉo
3. ołówek mechaniczny	3. mekanika/sarĝebila krajono
4. pióro wieczne	4. fontplumo
5. zakreślacz, marker	5. tekstomarkilo
6. flamaster	6. feltokrajono
7. ołówek złamał się	7. rompiĝis la pinto de la krajono
8. ostrzyć ołówek	8. pintigi krajonon
9. zmazać	9. elskrapi
10. pióro wypisało się	10. elĉerpiĝis la plumo
11. piórnik	11. skribilujo
12. kleks	12. inkmakulo
13. gumka do mazania	13. skrapgumo
14. temperówka	14. kraponpintigilo

Konkludo: Se vi eraris plurfoje, tio signifas, ke vi bezonas la vortaron. Se plimulto de viaj respondoj mankas aŭ estas eraraj, vi nepre bezonas ĝin. Se neniu el viaj respondoj estas korekta, kuru tuj al librejo. Ili ne havas?...*

La libro „**Angla–Esperanta–Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro**” de Ilona Koutny aperas kiel unua volumo en la serio de laŭtemaj vortaroj „Celtrafo” de la eldonejo Prodruck en Poznań; poŝformato, 143 p., prezo 13 zł.

*Ĉiu (ankaŭ librejoj) povas mendi ĝin ĉe la aŭtorino:

ul. Pobiedziska 14/22, 61–052 Poznań; rete: ikoutny@amu.edu.pl.

Recenzis: Maria Majerczak



„Komencanto“

„Komencanto“ estas tre simpatia internacia gazeto por ĉiu, kiu lernas, posedas aŭ instruas Esperanton. Speciale taŭgas por kursoj, grupoj, societoj. Regule aperas ekde 1998. 16 paĝoj A4, 6 kajeroj jare.

🐾 Kiel tio komenciĝis?

Konataj aktivuloj, prezidantoj de asocioj, redaktoroj, eminentuloj rakontas, kiel ili estis komencantoj; pasintjare: Kep Enderby, Renato Corsetti, Humphrey Tonkin kaj aliaj.

Ĉi-jare: Ĝenerala Direktoro de UEA Trevor Steele, akademiano Andre Cherpillod, kompilanto de *Pasporta Servo* Derk Ederveen, Prezidanto de Rusia E-Unio Garik Kokolija, redaktoro de *Brazila Esperantisto* Fabricio Valle kaj aliaj interesaj kaj eminentaj personoj.

🐾 *Historio de esperanta literaturo.* Ĉi-jare: la dua periodo — aŭtoroj kaj verkoj.

🐾 Poetikaĵoj kaj noveletoj de komencantaj aŭtoroj.

🐾 Amuza Gramatiko, ekzemple:

Vidu arbon, havu monon,
Verku libron, aŭdu sonon,
Kaptu musojn, manĝu ion —
Uzu la akuzativon.

🐾 Neelpensitaj historioj — amuzaj okazaĵoj, kiuj vere okazis al niaj legantoj aŭ iliaj proksimuloj. Kurtaj rakontoj akompane de spritaj bildoj.

🐾 Tempo kaj homoj — temo por eldiri siajn vivajn konsiderojn per bildetoj, frazoj, aforismoj, proverboj.

🐾 Aforismoj — *Aforismo estas kva-zaŭ mini-jupo: kurte kaj vidinte.*

Estonteco de literaturo estas en aforismo — oni ne povas produkti el aforismo kinofilmon.

🐾 Anekdotoj — En Rusio la vorto „anekdoto“ signifas la samon, kion en E-o la vorto „ŝerco“. Estas ŝercoj je

diversaj temoj, kiujn elektis, selektis kaj esperantigis niaj legantoj. Tre gaja paĝo.

🐾 Enigmoj, Rimaro, Proverboj: diasta paĝo por iom cerbumi.

🐾 Invitoj kaj Informoj: informoj pri kaj Invitoj al E-renkontiĝoj, konkursoj, radioelsendoj ks.

🐾 Anoncetoj Korespondu! — anoncetoj kaj korespondadreso el la tuta mondo.

Tra la tuta revuo, de kovrilo ĝis kovrilo ilustras la paĝojn kaj tekstojn fajnaj kaj spritaj bildoj, kiujn pentras kaj desegnas nur esperantistoj-legantoj de „Komencanto“.

Por aboni, turnu vin al via landa peranto aŭ al UEA (konto de „Komencanto“ estas **vkud-a**). Abonprezo 15 eŭroj (vi ricevos ĉiujn numerojn de la jaro), aŭ rekte al la redakcio kontraŭ 18 irk. (internaciaj respond-kuponoj). Pro-numero — 3 irk.

Adreso de la redakcio de „Komencanto“:

komencanto@r66.ru
pk 132, Ekaterinburg,
RU-620041, Rusio.

Maria Majerczak

.....
: Okaze de 44-jariĝo de Esperanto :
: elsendoj de Pola Radio, ni deziras :
: plurajn, multjarajn sukcesojn al :
: niaj karaj gekolegoj el la Esperan :
: to-Redakcio. Efektive tiomjara ek :
: zisto de Esperantaj disaŭdiĝoj plej :
: bone atestas, ke malgraŭ ideolo :
: gijaj ŝtormoj kaj dividoj inter espe :
: rantistoj, profesie farata laboro :
: povas supervenki ĉion. Gratulan :
: te Vian gravan laboron, ni esperas :
: ekhavi pli firman kontakton kun la :
: Redakcio. :
: Ni deziras ankaŭ samajn sukcesojn :
: al la tuta pola Esperanto-movado! :
:.....

Preskaŭ ĉio pri akuzativo

Estas sciate, ke en Esperanto ekzistas nur **3 deklinaciaj kazoj**: nominativo (mianownik), **akuzativo** (biernik) kaj prepozitivo (przypadek przyimkowy). **La prepozitivo** estas montrata per helpo de prepozicioj: **de, al, ĉe, pri, sen**, kiuj principe estas korekte aplikataj de esperantistoj. Oni povas tamen rimarki, ke multaj komencantoj **pekas kontraŭ la akuzativo**. Tio signifas, ke tiu ĉi deklinacia kazo bezonas pli vastan klarigon, baziĝantan sur Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.

En la komenco ni rememorigu al ni, ke la akuzativo estas montrata ĉiam per la finaĵo **-n**, kiu almetiĝas al substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj **en singulara kaj plurala formoj**: **ekz.**: Ni vidas instruiston. Ni vidas novan instruiston. Ni vidas lin. Li salutas ĉiujn gelernantojn. Li salutas ilin. La akuzativan finaĵon **-n** ricevas ankaŭ propraj nomoj kaj geografiaj nomoj finiĝantaj per prononcata vokalo: **ekz.**: Eva amas Adamon. Mi ŝatas Mielnon. Ŝi vokas Tadeon. Ni vizitas Pomerion. Ĉiuj admiras Varsovion. Mi neniam vidis Parizon.

Kiam la propraj nomoj finiĝas per **prononcata konsonanto** ni uzas **-on**: **ekz.**: Li volonte legas Schiller-**on** kaj Shakespeare-**on** (oni ankaŭ skribas: Ŝekspiron).

Plej ofte ni uzas la akuzativon tiam, kiam nia ago rekte trafas la objekton: **ekz.**: Mi perdis monon. Ŝi havas zorgon. Li amuzas gastojn. Ili trinkas vinon. Mi skribas leteron. Ŝi malfermas fenestron. Ili fumas cigaredojn, ktp.

La akuzativan finaĵon ricevas demandaj adverboj: Kien vi iras? (tien, nenien).

Kiun libron li aĉetis (la Faraonon), Kian libron vi legas? (interesan libron), ktp.

RIMARKO: Post negacio esprimita per transitiva verbo, rekta komplemento havas ĉiam **akuzativan formon**. (Mi ŝatas kafon. Mi **ne** ŝatas kafon. Ili **ne** trinkas vinon).

Ĝenerale parolante la akuzativo estas aplikata en jenaj situacioj:

1. Post verboj aktivaj, transitivaj: Ŝi pentras belan naturon. Li legas hodiaŭan gazeton. Mi **ne** legas gazeton, sed mi aŭskultas radion.

2. Post verboj netransitivaj aŭ neŭtralaj, se tio ĉi ne kaŭzas dusencon: Ŝi obeis la patrinon (al patrino). Li helpis la patron. Mi rememoras iun (pri iu).

Mi ridas lian naivecon (= pri lia naiveco), Mi dankas vin (al vi).

RIMARKO: Ekzistas kelkaj verb-

oj, kiuj samtempe povas havi transitivity kaj netransitivity formon, **ekz.:** Mi partoprenis la kongreson (...en la kongreso).

Esence netransitivity oni sentas la **iĝi-verbojn**. Oni do ne diras: kutimiĝi ion, (sed: **al io**), **sciigi** ion (sed: **pri io**), kvankam oni povas diri: ekscii ion, ekkutimi ion.

3. Post dudirektaj verboj: skribi leteron al iu, doni (prunti) libron al iu, savi iun de io, instrui iun pri io, peti ion de iu (iun pri io) ktp., ktp.

RIMARKO: Oni ne povas diri: Mi instruas gelernantojn Esperanton, **sed oni devas diri:** Mi instruas Esperanton al gelernantoj. Lernanto petas libron de instruisto, **aŭ:** Lernanto petas instruiston pri Esperanta lernolibro.

4. Se la substantivo estas akuzativa ankaŭ la pronomo devas esti tia, ekz.: Oni batas knabon. (Kiun ili batas?) Ili batas lin.

5. La verboj: sidi, iri, kuŝi povas havi rektan objekton starantan en akuzativo, **ekz.:** Sidi seĝon, kuŝi liton, iri vojon, kvankam ordinare oni uzas post ili **prepozicion:** sidi sur seĝo, kuŝi en lito.

RIMARKO: Post kelkaj verboj oni povas dubi, ĉu ili esprimas movon aŭ komencon de mova stato, **ekz.:** sidiĝi, kuŝiĝi, ekkuŝi ktp. Post ili Zamenhof konsilas uzi ĉiam la nominativon (sidiĝi sur seĝo [**ne:** sur seĝon]), li ekzidis sur seĝo (= komencis sidi sur seĝo). Ekzistas ankaŭ la elasta verbo **meti**. Ĝi estas uzata ne nur en la senco **loki ien** sed ankaŭ anstataŭ **apliki,**

uzi, ekz.: meti demandon. Meti (apliki) punkton post frazo, ktp.

6. Ĉe datado kaj tempodifino, ekz.: Koszalin, la 10an de majo 2003 jaro.

Mi venos Mielnon lundon, la 16an de junio. Mi naskiĝis la 20an de marto.

RIMARKO: Oni uzas akuzativon se temas pri difinita tago, ekz.: Mi venos al vi sabaton. (Kiun tagon vi venos al mi?) Al teatro ni iros dimanĉon, ktp.

7. Ĉe indiko de daŭranta ago, ekz.: Mi okupiĝas pri Esperanto dudek jarojn.

ĈEP-araĝo en Mielno daŭros 9 tagojn. Li restos ĉe mi unu semajnon.

8. Por difini mezuron, prezon, pezon, ekz.: Varsovio havas milionon da loĝantoj. Mia ĉambro estas tri metrojn alta. La patrino aĉetis unu kilogramon da pomoj. Li pezas pli ol 100 kilogramojn. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn. „Ampleksa Pola–Esperanta Vortaro” kostas nur 30 zlotojn.

9. Por esprimi direkton aŭ celon de movo, ekz.: Mi veturas Varsovion. Miaj gefiloj iras lernejon. Ili iras preĝejon. Li metis sian libron sur la tablon. Kateto kuris sub la liton. Ŝi iris inter la kunvenintojn.

RIMARKO: La akuzativo estas uzebla nur tiam, kiam oni atingas la internon de la celo. Oni ne povas diri: **Mi iras mian amikon** (sed: ...al mia amiko), **sed estas uzataj formoj:** Mi aliris mian amikon. Mi alkuris arbon. Ili suriris monton. **Oni ankaŭ di-**

ras: Ni iru: hejmen, dekstren, maldekstren (liven), tien kaj reen, flanken, antaŭen ktp.

10. Logike oni povas ankaŭ uzi la akuzativon post „ĉe”-prepozicio, kaj multaj esperantistoj nuntempe faras tion, **ekz.:** Venu ĉe min (en mian domon), Iru ĉe kuraciston (dentiston), Li prenis la filon ĉe sin (al ĉe si), Li iris ĉe la muron (**sed:** staris ĉe la muro). Transloĝiĝi ĉe iun.

RIMARKO: La tradicio, sekvante la ekzemplon de L. Zamenhof, rigardas tian uzon nekorekta, tamen uzado de la akuzativo post „ĉe” prosperas.

11. Post la prepozicio „kontraŭ”, la akuzativo precizigas direkton de movo, **ekz.:** Kain leviĝis kontraŭ sian fraton. Li frapis sin kontraŭ dikan muron. Ŝi levis sian vizaĝon kontraŭ la plafonon.

12. Post la prepozicio „po” estas uzata nominativo aŭ akuzativo, ekz.: Al ĉiu lernanto mi donis po du libroj. Al ĉiu soldato oficiro donis po 100 zlotojn.

13. Post la prepozicio „tra” oni ne uzas akuzativon, ĉar tiu ĉi prepozicio mem montras la movon, tamen verbo kun „tra”-prepozicio en la funkcio de prefikso fariĝas transitiva kaj bezonas la akuzativon, **ekz.:** tradormi la nokton, tralerni la libron, tralabori la tagon, tradiboĉi ĉion. ktp.

14. La akuzativan finaĵon „-n” ricevas ankaŭ adjektivoj, ordaj numeraloj kaj preskaŭ ĉiuj pronomoj (personaj, posedaj, demandaj, montraj).

15. Neniam oni uzas akuzativon

post la movaj prepozicioj: de, el, preter, al, ĝis, ĉar ili per si mem jam esprimas sufiĉe la movon. **ekz.:** en la direkto de... (aŭ: direkte al...), ĝis la stratangulo, rakontoj el trans la montoj.

MEMORU: Post ĉiuj sube skribitaj verboj la objekto havas la **akuzativan finaĵon:**

tuŝas, tenas, fermas, montras, faras, pentras, prenas, metas, amas, ŝatas, lernas, batas, ludas, havas, legas, levas, lavas, donas, vidas, aŭdas, skribas, segas, tranĉas, aŭskultas, fumas, rigardas, ktp.

Provu mem konstrui frazojn kun supre skribitaj verboj. **Mi deziras al vi sukceson.**

Czesław Baranowski



Kion fari pri akuzativo?

Atentu ĝin

Komprenu ĝin

Uzu ĝin

Zorge

Akordigu ĝin

Taŭge enmetu ĝin

Inde ellasu ĝin

Venku la regulojn

Obeu la postulojn.

Tabelo de korelativoj

Kiu	Kiu domaĝas sian groŝon	Kiel	Kiel sonĝo nokte ĉirkaŭprenas
T...	Tiu la tutan perdas poŝon	T...	Tiel fabelo al ni venas
I...	Iu el banko monon ŝtelis	I...	Iel diablo trovas mielon
N...	Neniu salajron ricevis	N...	Neniel venas ĝi ĉielon
Ĉ...	Ĉiu koleris.	Ĉ...	Ĉiel inferon.
Kio	Kio aromas bele, flore	Kial	Kial la vivon hom' malbenas?
T...	Tio ĝojigas nin enkore	T...	Tial, ĉar ĝin li ne komprenas
I...	En herbaĉejo io brilas	I...	Ial lin ravas la esenco
N...	Nenio, kio tre utilas	N...	Nenial pensas li pri senco
Ĉ...	Ĉio verdiĝas.	Ĉ...	Ĉial pri potenco.
Kia...	Kia dumviva estas ago	Kiam	Kiam printempo jam foriras
T...	Tia finfine venas pago	T...	Tiam somero komenciĝas
I...	Se ia aĉa estas sono	I...	Iam aŭtune brilas la suno
N...	Nenia bona la resonado	N...	Neniam vintre mankas la luno
Ĉ...	Ĉia fitono.	Ĉ...	Ĉiam plena lumo.
Kie	Kie kato kutime kuras	Kies	Kies hararo brilas kupre
T...	Tie musetoj ne susuras	T...	Ties ruĝiĝas kapo supre
I...	Ie timigis la malpaco	I...	Ies diraĵoj estas fortaj
N...	Nenie estas nun minaco	N...	Nenies pensoj ĉiam laŭvortaj
Ĉ...	Ĉie bonŝanco.	Ĉ...	Ĉies senmortaj.
Kien	Kien iri nun li sopiras	Kiom	Kiom da bela florodoro
T...	Tien la lumo ne altiras	T...	Tiom da amo en la koro
I...	Ien deziras li migradi	I...	Iom en le mondo vagadi
N...	Nenien tamen jam vagadi	N...	Neniom grave suferadi
Ĉ...	Ĉien kuradi.	Ĉ...	Ĉiom agadi.

Danuta Želińska

Dronigo de Marzanna*

Dronigo de Marzanna estas la moro konata jam de la XV jarcento. Marzanna estas la manekeno (pupego) imaganta danĝeran diinon de morto kaj de vintro, kaj ĝia nomo devenas de slava vorto *mru* aŭ *moriu*.

Tiu kutimo prezentas la batalon inter vintro kaj printempo, kaj ĝi konsistas el du elementoj.

Unu el ili estas la forigo de ĉiuj malbonaj potencoj, malsanoj, demonoj kaj multaj diversaj malfacilaĵoj, la alia estas la okazigo de necesaj en printempo pluvoj, per dronigo de pupo vestita per virina ĉifona kostumo.

La dronigo de Marzanna okazas aŭ la 21an de marto, la tago komencanta la printempon, aŭ en iu el antaŭprintempaj tagoj, kiam malaperas neĝo, kaj aperas unuaj floroj.

La manekeno estas farita el pajlo, vestita per ĉifonaĵoj, kaj sur ronda tola kapo oni dignas per kreto aŭ karbokrajono okulojn, nazon, buŝon. Ofte ĝi estas ankaŭ ornamita per paperaj rubandoj, floroj, ktp.

Por havi certecon, ke la manekeno rapide subakviĝos, en ĝian internon oni metas ŝtonon. La grupo de gejunuloj marŝante en procesio kun gajaj krioj portas Marzannan al proksima rivero por solene dronigi ĝin.

Ĉe la rivero kun suprenlevita manekeno ili laŭte diras konformajn sorĉadojn, kiel: „La vintro foriru! La malsanoj foriru! La malbono forlasu nin!” — kaj ili jetas ĝin en riveron.

Okazas ankaŭ, ke tiun agon antaŭigas parolado, ofte tre amuza, kaj finita per la vortoj: „Nu, fraŭlino, al akvo —

unu... du... tri...”

La manekeno devas esti ĵetita forte kaj precize por ke akvofluo tuj kaptu kaj dronigu ĝin.

Kiam Marzanna, tiu simbolo de la malbono, malaperas de antaŭ la okuloj de partoprenantoj, ili ĉiuj ĝojas, ĉar ĝuste en tiu momento alvenas la printempo.

Multe pli grandan impreson donas tiu solenaĵo organizita vespere ĉe la lumoj de torĉoj, aŭ brulŝtiparo, ĉe kiu gejunuloj ĝis malfrua nokto gaje amuziĝas.

Baldaŭ post la dronigo de Marzanna okazas Paska festo. Antaŭ ĝi la homoj preparas verdajn branĉojn, kiuj anstataŭas palmojn, kaj kiuj estas la simbolo de nova vivo.

Dum Palmofesto en katolikaj preĝejoj okazas konsekro de tiuj palmoj, kio memorigas la enveturon de Jesuo en Jerusalemon, kaj la solenan bonvenon organizita al Li de ties loĝantoj. La konsekritajn palmojn homoj enportas en siajn hejmojn, kredante ke ili dum la tuta jaro ŝirmos domojn, ĉiujn loĝantojn, kaj en kamparo ankaŭ brutaron kontraŭ diversaj danĝeroj.

En multaj vilaĝoj okazas la konkursoj pri la plej belaj kaj grandiozaj palmoj. Ili estas farataj el unu aŭ kelkaj, plej ofte salikaj, branĉoj, ornamitaj per diverskoloraj rubandoj. La palmojn oni komencas preparadi eĉ multaj semajnoj antaŭ Palmofesto. Ili estas vere imponaj, kaj havas diversan longecon — la ceteraj atingas eĉ dekelkajn metrojn.

Danuta Ŵelińska

(* elparolu: Majanna.)

Mariavitoj

La 27an de majo du poldevenaj eklezioj — Malnovkatolika Eklezio de Mariavitoj kaj Eklezio Katolika de Mariavitoj — festas jubileon de naskiĝo de sia fondintino Maria Franciszka Kozłowska. Lasu min, karaj legantoj, uzi la pretekston por, almenaŭ skize, pliproksimigi historion de mariavitismo kaj ĝiajn unikajn ligojn kun Esperanto.

Maria Kozłowska naskiĝis en 1862 en Wieliczna. Ekde infanaĝo ŝi revis pri vivo en klostro, kiun revon realigis en 1883 — en dudek unua jaro de sia vivo. Post kelkaj jaroj ŝi ricevis de siaj superuloj ordonon organizi en Płock novan ordonon — unue je la nomo „Societo de Fratinoj Malriĉaj de Sankta Klara”, kiu post nelonga tempo ŝanĝiĝis al „Societo de Fratinoj Mariavitinoj de Senpaŭza Adorado”, kies membrinoj, krom la tri kutimaj monaĥaj promesoj: de malriĉeco, ĉasteco kaj obeemo farus ankaŭ la kvaran: de senpaŭza adorado de la Plej Sankta Sakramento.

La komencon impulson por kreo de nova eklezio donis la revelacio, kiun fratino Kozłowska spertis la 2an de aŭgusto 1893, nomata en la mariavita eklezio kiel la Verko de la

Dia Mizerikordo. Poste ŝi tiel skribis pri ĝi:

En jaro 93, tago la 2a de aŭgusto, post finaŭdo de la Sankta Meso, subite mi estis disigita de miaj pensoj kaj starigita antaŭ la Dia Majestato. Neimagebla lumeco plenigis mian animon kaj estis revelaciita al mi: ĝenerala malbono de la mondo kaj fina tempo — poste malstreĉigo de kutimoj de pastraro kaj pekoj kiujn faras sacerdotoj. Mi vidis la Dian Justecon direktigitan por puni la mondon kaj la Mizerikordon, donitan al la perdiĝanta mondo kiel la lasta savigo adoron de la Plej Sankta Sakramento kaj helpon de Maria. Post momento de silento diris la Sinjoro: „Por disvastigi la adoron mi volas ke fondiĝu Societo de Sacerdotoj nome mariavitoj, ilia devizo «Ĉio por pli granda Dia Gloro kaj adoro de la Plej Sankta Virgulino Maria»”.

La 2a de aŭgusto de 1893 estas oficiale konsiderata kiel komenco de mariavitismo. La nomoj „mariavito” kaj „mariavitismo” devenas de latinaj vortoj „Mariae vite imitantes” kiu signifas „sekvantaj vivon de Maria”.

Baldaŭ fondiĝis ankaŭ la sacerdota ordeno de la pastroj mariavitoj, kies nombro rapide kreskis.

En la jaro 1901 maraivitaj provincestroj prezentis detalan priskribon de revelacioj de fratino Kozłowska al siaj lokaj episkopoj kune kun peto de oficiala legaligo de ilia socio. Publikigo de informo pri la revelacio iĝis turna momento en historio de la Societo de Fratinoj Mariavitinoj. La Romkatolika Eklezio oficiale malakceptis la revelaciojn de Maria Franciszka Kozłowska. Konsekvence, en la jaro 1904 aperis dekreto de la Sankta Ofico pri malfondo de la mariavitaj ordenoj. Ĝi tamen ne estis obeita per ties membroj. En aprilo 1906 papo Pio la Deko publikigis enciklikon „Tribus criticis” avertantan pri ekskomuniko por ĉiuj mariavitaj kiuj ne lasos la ordenon. Post daŭra manko de rezulto, finfine, en decembro de la sama jaro la Sankta Ofico konstruis dekretan enhavantan ekskomunikon por ĉefaj personoj de la mariavita movado — la fondintino Maria Kozłowska kaj la pastro Michał Kowalski, kaj por ĉiuj aliaj anoj de mariavita movado — pastroj kaj laikoj — averton de sama ekskomuniko, se ili ne lasos la movadon dum sekvaj 20 tagoj. Okazis skismo. Por daŭrigi en sia eklezio apostolan sukcesion, mariavitaj pastroj kreis rilatojn kun la malnovkatolika eklezio en Nederlando. Kiel rezulto en oktobro 1909 en Utrechto pastro Michał Kowalski estis konsekrita kiel episkopo kaj la Eklezio estis oficiale akceptita kiel membro de Utrechta Unio — ligo de eklezioj

malnovkatolikaj.

Maria Franciszka Kozłowska mortis la 23an de aŭgusto 1921. En tiu tempo la kreita de ŝi eklezio havis ĉirkaŭ 43 miloj da kredantoj, 33 pastrojn, inter ili 3 episkopoj; pli ol 200 monaĥinojn, 80 preĝejojn, 7 klostrojn, 26 proprajn lernejojn, 45 infanĝardenojn... En 1935 jaro, rezulte de internaj disputoj (interalie pri geedziĝo de mariavitaj pastroj kun monaĥinoj), la eklezio dispartiĝis al du apartaj eklezioj — ambaŭ ekzistantaj ĝis nun — la Malnovkatolika Eklezio de Mariavitaj kaj — ne tiel nombra — la Eklezio Katolika de Mariavitaj.

Kiel ĉiuj eklezioj malnovkatolikaj, mariavitaj kredas nur je dogmatoj akceptitaj dum la unuaj sep kristanaj sinodoj (tiel nomataj „sinodoj ekumenaj”), antaŭ la unua disigo de kristanismo en la jaro 1054. La principon oni povas esprimi per vortoj: „Ni kredas tion, kio estis kredita ĉiam, ĉie kaj de ĉiuj”. Mariavitaj akceptas nek specialan rolon, nek senrarecon de instruado pri kredo kaj moraleco de papo, nek de iu ajn alia episkopo. Dua grava bazo de mariavita kredo estas kompreneble la libro de revelacioj de Fratino Kozłowska. Kiel sia ĉefa celo mariavitaj konsideras disvastigon de adorado de Sankta Sakramento kaj montrado de nepreco senpaŭze peti helpon de Sankta Maria. La kulto de la Plej Sankta Sakramento montriĝas en adorado kaj ofta sankta komunio. En la Malnov-

katolika Eklezio de Mariavitoj ĉiu kredanto havas devon de almenaŭ unuhora individua adorado de Sankta Sakramento ĉiusemajne kaj komuna, solena, ĉiumonate. Pastroj kaj monaĥinoj devas adori Dian Korpon ĉiutage.

En Malnovkatolika Eklezio de Mariavitoj ekde 1924 jaro ne ekzistas celibato de pastroj, kiuj povas havi edzinon laŭ sia propra volo. Gravas nur, ke pastroj edziĝitaj, same kiel celibatuloj, vivu en la franceskana etoso. La eklezio ne akceptas sanktajn, miraklajn relikviojn kaj bildojn. Ne neigas tamen grandan estimon, kun kiu oni devas ilin trakti. Komunio estas donata al kredantoj je ambaŭ formoj. Ekde komencoj de mariavitismo mesoj estas celebrataj en la pola lingvo. Ĉiuj religiaj servoj estas donataj senpage. Oni ne uzas interdiktojn kaj ekskomunikojn. La eklezio estas membro de Pola Ekumena Konsilio.

Apartan mencion meritas ligoj inter mariavitismo kaj Esperanto.

Pastroj mariavitaj trovis en la ideoj de Zamenhof multajn punktojn tre similajn al ilia propra socia programo. Komence de tridekaj jaroj de la pasinta jarcento praktike ĉiuj mariavitaj pastroj konis Esperanton. En adreslibro de polaj esperantistoj kompilita en 1931 jaro de Jan Zawada oni trovas nomojn de 33 mariavitaj pastroj. Por kompari, en la sama libro troviĝas nur 28 — inter ja ĝenerale nekompareble

pli nombraj — pastroj romkatolikaj. En la jaro 1931 fondiĝis Maria-vita Esperantista Ligo (MEL), eldonanta dulingvan revuon: „Renkonte al la Suno” (bedaŭrinde, pro nekodataj al mi hodiaŭ kaŭzoj, aperis nur tri numeroj de la revuo). Delegitoj de la ligo partoprenis multajn landajn kaj internaciajn esperantistajn renkontiĝojn, ofte salutante partoprenantojn nome de mariavitoj.

Sendube grandan meriton por disvastigo de Zamenhofa lingvo inter mariavitoj havis pastro Adam Bazyli Furmanik, lerninta Esperanton jam kiel knabo, nur unu jaron post la apero de la Unua Libro, poste ankaŭ membro kaj delegito de UEA, tre aktiva esperantisto ĝis fino de sia longa, 88-jara vivo en la jaro 1959.

Esperanto estis ankaŭ instruata en mariavitaj lernejoj, en klasoj ekde la 4a ĝis la 7a kaj dum aŭtodidaktaj kursoj por junularo organizitaj en ĉiu paroĥo. Lecionojn de Esperanto oni presis en jaroj 1933–35 en monatrevuo „Templariusz” eldonata de ligo de mariavita junularo „Templariusze”. Jam en la unua numero de la revuo, eldonita en majo 1933 oni legas: „Esperanto estas lingva idealo, la plej mirakla simbolo de universala reviviĝo en ĉiuj flankoj de vivo de popoloj”. Laŭ unuaj planoj ĉiuj anoj de la junulara societo devintus plenumi ekzamenon je kono de Esperanto. Celo de la instruado estis enkonduki Esperanton kiel la duan lingvon konatan de ĉiu

ano de la eklezio kaj uzatan por internaciaj kontaktoj inter kredantoj. Bedaŭrinde baldaŭ okazis, ke malgraŭ klopodoj de pastraro, la lekcionoj ne trovis sufiĉan intereson inter mariavita junularo.

Al realigo de la plano malhelpis ankaŭ la dua mondmilito, post kiu la esperantista mariavita movado renoviĝis nur en malgranda grado. Tamen plu, kvankam jam ne plu je tiel granda skalo, estis organizataj kursoj de Esperanto ĉe kelkaj mariavitaj preĝejoj. Esperanton lernis ankaŭ novaj, junaj mariavitaj pastroj.

En Esperanton estis tradukitaj multaj libroj traktantaj pri mariavitismo, inter alie la libro de revelacioj

de Franciszka Kozłowska.

Pastroj mariavitaj havis ankaŭ viglajn rilatojn kun aliaj kristanaj esperantistaj organizaĵoj, inter alie romkatolika Internacia Katolika Unuiĝo Espeantista (IKUE) kaj — protestanta — Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), legante kaj abonante iliajn revuojn, tamen mem ne estante membroj de la organizaĵoj.

Katarzyna Tempczyk

Al la legantoj interesantaj pri pliaj detaloj kaj pli ampleksa priskribo de ligoj inter mariavitismo kaj Esperanto mi kuraĝas rekomendi mian pollingvan artikolon aperigitan en la 28 kajero de mariavita revuo „Prac nad sobą” en marto 2003. ❁



Via volo...

Kion al Vi diri?
Ĉu gravas parolo?
Surgenue petas
mi pri Via volo.

Vi plej bone scias,
kion mi bezonas.
Mi preĝas silente,
Vi gracojn disdonas.

Antaŭ ol mi pensos,
Vi jam scias ĉion,
do mi ĉiam volas
danki al Vi, Dio.

Kantu mia koro,
Vento portu preĝon
al ĉielo blua
kaj plej Alta Seĝo.

Bogusław Sobol

*Dankema pro la renaskiĝinta „Pola Esperantisto”
mi dediĉas tiun ĉi versaĵon al Estimata Redakcio.*

KELKAJ KONSILOJ POR KUNLABORANTOJ

(KAJ NE NUR)

Karaj geamikoj. Kvankam vi tenas en siaj manoj jam la trian numeron de PE, estas homoj, kiuj ĝuste nun volas aboni la revuon, ĉar eble ne sciis antaŭe pri ĝi, aŭ volis konvinkiĝi, ke tion fari valoras.

Por ĝuste informi ilin (kaj vin) mi klarigas kelkajn aferojn.

1. Por fariĝi abonanto oni devas: (a) komuniki tion al la eldonisto, (b) sciigi sian plenan adreson kaj (c) pagi la abonkotizon.

2. Tiuj, kiuj havas la eblecon uzi interreton, povas trovi sur la paĝo www.hejme.e-tools.pl kaj konvenan formularon, kaj ĉiujn indikojn pri la abontarifo, konto-numero, adreso, ktp.

3. „Interret-ne-uzantoj” povas simple sendi la abonilon, aŭ poŝtkarton al la Eldonejo HEJME, kaj samtempe pagi al la banko aŭ per ruĝa pagilo al la sama adreso. Se iu sendas monon al la banko *sed ne informas pri sia abono*, povas hazarde atendi tre longe la sendaĵon, ĉar ofte la banko ne indikas plenan nomon kaj adreson de paginto!

4. Abontarifo troviĝas ankaŭ en ĉiu kajero de la revuo en kolofono. *Atentu!* Fine de marto ŝanĝiĝis kaj la banko kaj ties konto-numero (pri tio mi informis en la 2a n-ro de

PE). *Tio signifas, ke malnovaj „Aboniloj” kaj informoj en la 1a numero de PE pri konto-numero jam ne plu aktualas!*

5. Ĉiu abononto ricevos la antaŭajn numerojn de la revuo, ĉar la abono rilatas la tutan kalendaran jaron.

7. La abontarifo por eksterlanden sendata revuo varias, depende de lando (pro diversaj sendokostoj). Do, se iu abonas la revuon por iu eksterlanda amiko kaj indikas ties ekster-pollandan adreson, devas pagi laŭ „eksterlanda” tarifo.

Kaj nun la informoj (kaj petoj) por kunlaborantoj.

8. *Se vi skribas viajn tekstojn per komputilo:*

(a) sendu ilin elektronike per ret-poŝto, por ke ni ne estu devigitaj de nove tajpi la samon;

(b) uzu Unikodan tiparon kaj kodigon, **neniam** Latin-3 aŭ io ajn simila (specialaj E-tiparoj);

(c) se vi ne scipovas skribi kun ĉapelitaj literoj, uzu ‘X’-metodon (cx, gx, sx, ktp) kaj ne la t.n. „Zamenhofan metodon” (ch, gh, sh, ktp). Bedaŭrinde Zamenhof nenion sciis pri komputilaj aferoj!...

(ĉ) se tio eblas (certe jes...) skribu Esperante!

(d) apliku la ĝustan interpunk-

cion, same kiel en la pola lingvo. Do: metu la spacon (ĉiam nur unuopan!) post punkto [.], dupunkto [:], koma [,], punktokoma [;], interjekcio [!], demandosigno [?], kaj **neniam antaŭ ili!** Ankaŭ interne de krampoj oni ne metas la spacon [(bone), (-malbone)];

(e) antaŭ sendo de tekstoj, kontroli ilin, ĉu ne restis ieraroj, mistajpaĵoj, ktp. Oni devas scii kaj memori, ke la cifero „unu” ne estas sama, kiel la litero „l” kaj granda I, kaj ne povas esti anstataŭe uzata;

9. se vi tajpas per skribmaŝino, uzu sufiĉe novan inkorubandon kaj donu duoblan interspacon. Tajpu nur sur unu flanko de papero;

10. se vi skribas permane, faru tion klare kaj bedaŭru, ke vi ankoraŭ ne havas komputilon...

Fine:

11. Sendu ĉiujn informojn kaj kontribuojn, kiujn vi taksas valoraj por diskonigo, kaj faru tion ĝustatempe. Por publikigi novaĵojn en plej proksima eldono de la revuo, ili devas atingi la redakcion ĝis la 25a tago de la antaŭa monato (ekz. por la 4a numero ĝis la 25a de junio).

12. Reagu al la invitoj diskuti, esprimu libere viajn opiniojn pri la enhavo, viajn dezirojn, ktp. Memoru, ke ankaŭ vi povas esti kuredaktoro!

13. Pagu propran abonon! (kelkaj ĝis nun tion ne faris, kvankam ili solene promesis...).

Kazimierz Leja

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino, aperas monate, eldonata en Kaliningrado, Ruslando. Unu el plej interesaj revuoj de nia Esperanta komunumo. Abonebla kontraŭ 15 USD ĉe la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio, 44-101 Gliwice, skrytka 21.

Tornado

Monata, pollingva bulteno de junulara klubo „Varsovia Vento”, tre interesa, eldonata pli kaj pli bele, 10 n-rojn jare. Abonebla kontraŭ 40 zł. ĉe: Ireneusz Bobrzak, 03-226 Warszawa, str. Toruńska 82/133.

Dia Regno

Dumonata organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia (protestanta). Abonebla kontraŭ 30 zł ĉe: Kazimierz Leja, 41-250 Czeladź, skr. poczt. 59 (NE sendu monon al la konto de la Eldonejo HEJME!).

Baldaŭ aperos:

✱ „La Pereintoj in memoriam” de Zofia Banet-Fornalowa. Grava historia verko pri sesopo da Esperantaj herooj, pereintaj dum holo-kaŭsto.

✱ „Lecionoj de Koresponda kurso” prilaboritaj laŭ Emil Pfeffer, Esperanto w 10 lekcjach.

✱ „Esperanto Junul-Kurso” laŭ fama franca originalo, eldonita de SAT-Amikaro.

✱ „Gramatiko de Esperanto-simple” de Danuta Źelińska.

Ĉiuj ĉi libroj en via ŝatata

✱ Eldonejo HEJME ✱

Pola Radio

Esperanto–Redakcio de Radio Polonia disaŭdigas ĉiutage sian elsendon kvin fojn per mallongaj ondoj, satelito kaj interrete.

La premiera E–elsendo de Pola Radio estas aŭdigata je la 15.00 h (laŭ la Universala Tempo) per la mallongaj ondoj 41,26 metroj respektive 7270 kilohercoj kaj per la ondo 41,18 metroj respektive 7285 kHz. La ripeto okazos je la 18.00 UT per la ondo 41,18 metroj respektive 7285 kilohercoj.

La elsendo estas ripetata la saman tagon je la 19.00 UT nur satelite. Post ĝia emisio okazas la enretigo de la programo. La laŭvican fojon nur persatelite nia esperantlingva programo estas ripeta la sekvan tagon je la 08.30 kaj la 10.00 horoj laŭ la UT.

Por aŭskulti per la mallongaj ondoj necesas aldoni al la tempo laŭ UT 2 horojn. Ekzemple 15.00 + 2 h = 17.00.

La satelita ricevo estas ebla per: Eutelsat II F–6–Hot Bird–13 gradoj de la orienta latitudo; frekfenko 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz.

Eblas ĉiutage aŭskulti freŝan programon de Pola Radio en Esperanto, eblas ankaŭ aŭskulti programojn de la tuta lasta semajno. Oni povas uzi la hejmpaĝon de WRN: www.wrn.org.

La rimarkojn pri la programoj E–Redakcio de RP atendas rete:

esperanto.redakcio@radio.com.pl aŭ pietrzak@wa.onet.pl;

poŝte: Pola Radio, E-Redakcio, Al Niepodleglosci 77/85, 00-977 Varsovio, pk.46;

telefone: (+48-22) 645-93-37, 645-93-58;

fakse (+48-22) 645-59-17.

Feriado en Międzygórze

Partoprenkondiĉoj

1. Plenigitan aliĝilon bonvolu sendi al: Silezia Esperanto–Asocio, str. Dubois 3/1, 50-208 Wrocław, Pollando, aŭ rete al wroclavo@poczta.onet.pl ĝis la **fino de majo** 2003. Bonvolu klare indiki viajn elektojn pri la kurso kaj maniero manĝi.

2. Ĝis 30.05.2003 bonvolu antaŭpagi 200 zł aŭ 50 € en la konton:

PKO BP III O/ Wrocław N–ro 04 10205242 128392291.

Eksterlandanoj post interkonsento povas pagi ankaŭ surloke.

3. Telefona informado funkcias marde kaj ĵaŭde de 17:30 ĝis 20:00, tel. +48 71 329-69-54 aŭ rete wroclavo@poczta.onet.pl. La plej novajn informojn oni povas trovi ankaŭ ĉe la retejoj <http://wroclavo.republika.pl/> aŭ <http://free.ngo.pl/europonto/>.

ALIĜILO devas ampleksi:

Nomon kaj antaŭnomon; adreson (kun poŝta kodo); eet–adreson (se estas); indikon pri sekso (viro/virino); naskiĝdaton;

Ĉu vi intencas partopreni la lingvokurson por: komencantoj, progresantoj?

Ĉu vi preferas manĝi vegetare?

Kun kiu vi volas kune loĝi?

Per kio vi intencas pliriĉigi la programon?

Daton kaj subskribon.